La estiĝo de la firmao AVIA datiĝas en la jaro 1919, kiam en laborejo de malnova sukerfabriko en Vysočany estis komence riparataj aviadiloj kaj pli poste estis konstruita la unua aviadilo AVIA-BH-1.

En la jaro 1923 AVIA translokis sin en novajn, relative bone ekipitajn laborejojn en Holešovice, kie estis fabrikitaj pluaj tipoj. Ĉi tie estiĝis ankaŭ la transportaviadilo AVIA BH-25 kaj monoplane BH-11, kiu gajnis por AVIA la pokalon Coppa d'Italia. Estis konstruita la fama ĉasaviadilo BH-21 kaj pluaj maŝinoj.

Fine de la jaro 1931, sur la kampoj de la katastro en Letnany aperis novaj, tiutempe modernaj konstruaĵoj, kien AVIA translokis sin el Holešovice. En tiu ĉi etapo plej famiĝis la ĉasaviadiloj B-534, per kiuj estis ekipita nia aerarmeo. Ne malgrandan meriton pri bona famode AVIA havis ankaŭ la aviadiloj Av-122.

En la tempo de la faŝisma dangerigo estis rapide havigitaj novaj bombaviadiloj. En la jaro 1935 estis aĉetita licenca dokumataro pri moderna soveta bombaviadilo SB-2 (AVIA B-71).

Per la okupacio de Ĉeĥoslovakio finiĝis la unua historia etapo de AVIA. La laboruloj de la entrepreno batalis kontraŭ la okupaciantoj ne nur en la patrio, sed ankaŭ eksterlande kaj multaj el ili perdis la vivon en tiu ĉi batalo.

Post kiam la milito finiĝis en la jaro 1945, oni komencis rapide renovigi la fabrikadon en AVIA. Enkadre de la postmilita reorganizo de la ĉeĥoslovaka industrio estis dicivite, ke AVIA fabrikados ŝarĝautojn. Jam en la jaro 1946 estis preparita provotipo de la aŭto R 706 kaj en la jaro 1947 estis fabrikita la unua serio de aŭtomobiloj kaj aŭtobusoj. La aŭtoj kaj busoj R 706 estis fabrikataj ĝis la fino de la jaro 1952.

Poste AVIA rekomencis la aviadilan produktadon. Post la sovetaj batalaviadiloj B-33, en la jaro 1954 oni komencis fabrikii la transportajn aviadilojn IL-14, tio estis la plej granda tiuspeca tipo en Ĉeĥoslovakio produktata.

Grava limŝtono en la historio de la entrepreno estis la jaro 1961, kiam oni transiĝis al fabrikado de la meztonelaraĵoj PRAGA S5T kaj V3S. Al la ĉefa fabriko aliiĝis fabrikoj en Brno, Ivančice kaj Žilina. La aŭtoj S5T kaj V3S bone utilis en diversaj sferoj de la nacia ekonomio. Iliaj veturkapabloj kaj eblo pruvis sin bonaj en la plej diversaj klimataj sferoj kaj en malfacilaj terenoj.

LA NOVA ETAPO EN LA DISVOLVIGO DE LA ENTREPRENO.

Pro aĉetpetoj el an - kaj elsterlando pri aŭtoj kun malalta tonelaro estis en la jaro 1967 aĉetita la franca licenco por fabrikado de ŝarĝaŭtoj Renault-Saviem kun tonelaro 1,5 kaj 3 tunoj. Jam fine de la jaro 1968 la unuaj aŭtomobiloj kun marko AVIA A 15 kaj AVIA A 30 elveturis el la pordo de la fabriko.

La nova fabrikado kaj ĝia amplekso postulis konstruojn kaj modernigon de la entrepreno. Estis konstruitaj novaj grandaj haloj kun moderna ekipaĵo. Tiamaneire AVIA enviciĝis inter la plej grandajn ĉeĥoslovakaĵajn aŭtofabrikojn.

La fabrikataj aŭtoj AVIA plenumas ĉiujn postulojn de la urba kaj ŝosea trafiko kaj prosperas kaj en la hejma, kaj en la eksterlanda merkato.

En la nuna tempo, en la ĉefa fabriko, en Letnany estas fabrikataj ŝarĝaŭtoj kaj ĉasioj AVIA A 15, A 30, la aŭtoj PRAGA V3S kaj aviadilaj piŝtaj motoroj kaj helicoj por sportaj kaj terkulturaj aviadiloj.

Kadre de la entrepreno, sur ĉasioj AVIA estas muntataj pluaj alicelaj konsistaĵoj en la fabrikoj KAROSA en Jaroměř, ORLÍČAN an Chocen, SLOVÁCKÉ STROJÍŘNY en Uherský Brod kaj BAZ en Bratislava.

Kunlabore kun la hungara firmao IKARUS estas fabrikataj la aŭtobusoj VIA/IKARUS, kaj kun firmao AFIT en Győr tiraŭtoj sur la ĉasioj AVIA A 30.


Nuntempe la intereso pri la aŭtoj AVIA plialtiĝas ankaŭ na eksterlande, precipe en la socialismaj landoj.

Konekse kun la fabrikado, gravan taskon havas la komercaj-teknikaj aŭtoservoj, ĉar en Ĉeĥoslovakio uzatas ĉirkaŭ 40 mil aŭtoj AVIA. Tiel kiel enlande estas jam certigitaj aŭtoservoj, ĉar en ĉiu regiono funkcias reto de kontraktaj riparejoj, ankaŭ eksterlande funkcias bonaj aŭtoservoj. Al la ekonomia funkciado kaj al bona konservado de la aŭtoj, kiu influas la daŭron de ilia funkcikapablo, helpas ne malmulte la klerigado de stiristoj kaj mekanikistoj. Dum jaro alterne studas en la entreprena instrucentro eĉ 600 enlandaj kaj 60 eksterlandaj pertoprenantoj.

Ne nur la tradicion, sed ĉefe la perspektivojn starigas la nacia entrepreno AVIA je gravan lokon en nia nacia ekonomio - ĉe plua disvolvigo de la aŭtotrafiko. Tion pravas la planoj de la 7a jarkvino en la sferoj produkta, komerca kaj en plua teknika disvolvigo.

**SEN ZORGOJ
VI VENDOS**

**SEN RISKO
VI AĈETOS**



AUTOBAZAR

ENTREPRENO «KLENOTY»

EKSPORTO

- altefikaj, moderne konceptitaj maŝinoj por konstruaj, ŝoseaj kaj teraj laboroj
- internentreprene trafiko
- aertekniko kaj klimatizo
- ekspluatado kaj preparado de ercoj kaj karbo
- fervoja trafiko
- hidraŭliko kaj streĉsistemoj
- pretigejoj de trinka kaj industria akvo
- konstrukompletoj
- geologio
- levekipaĵoj

IMPORTO

- specialaj maŝinoj, investkompletoj
- teknologiaj ekipaĵoj
- el ŝtatoj industrie altnivelaj por investkonstruado
- kaj por industriaj entreprenoj en Ĉeĥoslovakio
- konstruaĵoj, ĉerptekniko



EXPORT

STROJEXPORT

IMPORT

PRAGA - CZECHOSLOVAKIA

STROJEXPORT
POB 662
Václavské náměstí 56
113 26 Praha 1

jitka

Bavlnářské
závody n.p.
Jindřichuv Hradec



Národní podnik Jitka nabízí spotřebitelům kepry v různých barevných odstínech na pracovní a ochranné ošacení, dekorální tkaniny, lužkoviny, technické tkaniny, plástoviny a letní oblekoviny.



VÝROBNÍ ZNAČKA JITKA JE ZÁRUKOU KVALITY



14-^a KONFERENCO
DE FERVOJISTA
SEKCIO.



PRAHA
13-14-a oktobro 1980

Jam kelke da tagoj antaŭen venis unuaj eksterlandaj gastoj. Tio ebligis interesan konversacion kaj diskutojn pri nia esperanta movado kaj pri fervojistaj aferoj. Vendrede venis ankau ĉiuj kiuj aligis, estis lokigitaj en hotelo "Kolektiv".

Sabate matene akompanis s-ano Kašparec la grupon al restoracio GONG, kie okazis propra konferenco. Ineuguron preparis tacmento de pioniroj, kiuj alportis, hisis kaj gardstaris esperantan flagon al frunto de la salono. Prezidento de Fervojista sekcio de ĈEA, inĝ. Kovář bonvenigis ĉeestantojn. Poste salutis konferencopn eksterlandaj gastoj el Aŭstrujo, Francio, Hungario, Japanio, GDR kaj Nederlando. Ni tre ege bedaŭris, ke ne ĉeestis aligitaj delegitoj el USSR, Pollando kaj Jugoslavio.

Konata Eva Seemanová riĉigis programon per majstra deklamo, de zorge elektita poezio. Ni dankas por speciale elektita fervojista poemo.

Propra laborkonferenco, kiun partoprenis ankaŭ estrarano de ĈEA Josef Novák okazis tuj post inaŭguro. Partoprenantoj aŭdis informon pri la laboro de sekcio. Dauris balotoj de novaj gvidantoj de sekcio, kiuj tuj poste traktis pri novaj taskoj. Partoprenantoj audis ankaŭ prelegon pri signalsistemo de fervojo, kiun sekvis vigla diskuto ĝis malfrua posttagmezo. Dimanche estis preparita komuna vizito de Teknika muzeo kaj traŭrigardo de nia ĉefurbo. Posttagmeze partoprenantoj disaŭdialis ĉe la stacidomo.

UEA pli proksima al UNO. La Esperanta-gazetaro informis pri gravega atingiĝo de Universala Esperanto Asocio: ĝi estis elektita en junio, pro sia aktiveco, en la Konstantan Komitato de la Konferenco de la Neregistaraj Organizaĵoj de UNESCO. UEA tiel fariĝis unu el la gvidaj neregistaraj organizaĵoj kun rilatoj al UNESCO.

"Esperantigo de la ĉeĥoslovakaj loknomoj" estas la titolo kaj enhavo de dekpaĝa detala geografia nomenklature de Josef Kavka /RNDr, CSc/ en la "Sciencia revuo", vol.29/1978, n-ro 3. Kiel konate, Kavka estis aŭtoro de la esperantigita nomenklature en la "Poŝatlaso de la mondo". - Kvankam presita en Brazilo, la artikolo enhavas ĉiujn diakritajn signojn /supersignojn/ de la ĉeĥa lingvo!

/jml/

Éva Tófalvi:

OMAĜE AL BLAISE CENDRARS
1913

Mi legas viajn poemojn amiko
kaj bruruliĝas ekspreso transsiberia
rulfaligas revojn kaj sopirojn
en ĝi - ankoraŭ dum tempo de paco -
soldatoj de 1^a sekvanta milito
kun kantoj sur lipoj
kun harmoniko sur ŝultroj
Kaj poste la batalo
la militpoŝtaj kartoj
En la sendaĵo de nekonata soldato
bildo de la hejmo laŭ imagoj
Kaj pli poste la hejmenigo
Kaj fine
La transformiĝo de la rememoroj
je artefarita piedo
je artefarita mano
je artefarita okulo
aŭ je bravula ordeno

/Belartaj Konkursoj 1979
Orig.poezio; Unua premio/

internacia panoramo

TEJO KONGRESO EN FINNLANDO

Jus aperis la Unua Bulteno de la venontjara 36-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, kiu okazos en urbeto RAUMA, en sudokcidenta Finnlando. La kongresaj datoj estos ekde la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1980. La kongresa ĉeftemo "popola kultura tradicio en la nuntempa mondo." Ĝi ebligas kunlaboron kun la "Pontosemajno", ĉiusomera

festoferiadi de Rauma, kiu okazos samtempe kun la kongreso. Informoj petu ĉe: LKK de la 36-a IJK, Anundilankatu 3, SF - 26100 RAUMA 10, Finnlando

NOVA VORTARO EN USSR.

En Riga - USSR aperis lukse bindita gramatiko kaj esperanto-latvia, latvia-esperanto vortaro. Libro en formato 125x170 mm kun 577 paĝoj enhavas kompletan gramatikon, klarigojn kaj riĉan vortaran parton. Eldonkvanto 10 000 da ekzempleroj. Aŭtoroj: E. Jaunvalkis, A. Gūtmanis. Eldonis ŝtata eldonejo LIESMA, RIGA. Prezo en USSR 1,40 rublo.

SKOTA INVITO

por la 64-a Brita Kongreso de Esperanto, kiu havos lokon en Edinburgo de la 4-a ĝis 7-a de aprilo 1980. Adreso: H. Goodhur, 16 Woodlands Drive, GB Coadbridge ML 5 1LE.

INTERNACIA FERVOJISTA

kongreso okazos de 16-a - 22-a de majo en nederlanda urbeto America/inter Eindhoven kaj Venlo/. Oni atendas partoprenon de fervojistoj el dudeko da landoj.

INTERNACIISTO

estas ofsetita presaĵo de Komunista Esperantista Kolektivo. Lasta numero alportis interesan riporton pri Nikaraguo. Pluajn informojn al vi donos: Francisko Haiderer, Selma - Lagerlöfsgasse 23/6 - A 1100 WIEN.

GAZETO DE ASA.

Ni estis informitaj, ke baldaŭ aperos unua numero de la

de Sovetaj Esperantistoj. Ni jam traktis kun la PŊS - dovoz tisku pri abono. Lau informoj, kiujn ni havas, jarkolekto enhavos 6 numerojn. Verŝajne la jarabonkotiĝo ne estos pli alta ol 20 - 25 Kĉs. Ĉiuj, kiuj jam nun volas certigi abonon skribu al ni sur PK.

22-a ESPERANTISTA SKIFERIO. Por la 22-a fojo Kultura Centro Esperantista en aŭgusta Chaux de Fonds organizos esperantistan skiferion. Ĝi okazos de la 27-a de decembro 1979 ĝis la 4-a de januaro 1980. Detalan informilon vi petu ĉe KULTURA CENTRO ESPERANTISTA, pf 771, Postiers 27, CH - 2301 LA CHAUX DE FONDS / SVISLANDO /

INTERNACIA FERIA ALTILERNEJO.

Unufoje prezentas en sia programo intensivajn kursojn, cele al preparo de lernantoj kiuj intencas kandidatiĝi por ekzameno pri Esperanto en sia propra lando.

La kursoj okazos en La Chaux de - Fonds, dum la tuta pasoka semajno 1980, paralele laŭ tri niveloj: elementa, meza kaj supera. La aranĝon gvidos profesiaj Esperanto-instruistoj, kun kompetenteco pri la programoj de la Esperanto-Institutoj france, germane, itale. Informas IFA, pf 771, CH 2301 La Chaux-de-Fonds.

KUBA GAZETO "JUVENTUD REBELDE" / kiun ni ricevis /, vaste informis 18-a de junio 1979 pri fondo de Kuba Esperanto Asocio ĉe Akademio de Kubaj sciencistoj.

UNUA BULTENO de 65-a UK de Esperanto / 2-9.8.1980 / en Stokholm estas bone preparita prospekto kun fundamentaj

informoj pri estonta kongreso. Eldonkvanto pli ol 35000 da ekzempleroj nesufiĉis por granda intereso.

ESPERANTA EKSPOZICIO

en Madagaskaro montris uti-lecon de la komuna interna-cia lingvo en rilatoj kun diversaj nacioj. Ekspozicion ordigis Roger Randrianekema, en regiono Ambatondrazaka, dum foiro. Vizitis ĝin ankaŭ eminentuloj de la lando.

KRONIKO

Kun granda bedaŭro ni anoncas forpason de eminenta poetino kaj tradukantino Milada Jakubcová, mortinta la 14-a de oktobro 1979. Ŝi atingis ĝon 80 jarojn. Sian du elstarajn verkojn estas: "Elektitaj versaĵoj" kaj "Estrado de Animaloj", kaj multegaj kontribuajtoj en Esperanto-gazetoj. Honoron al ŝia memoro.

Membro de LG Přerov, Ludvík Chytil festis antaŭ nelongesian 50 jaron kaj samtempe ankaŭ 25 jaran datrevenon de esperanta laboro. Ni ankaŭ gratulas kaj deziras multe da sano kaj personajn sukcesojn.

Kiu konas nian membron el la loka grupo BRNO - samideanon Vondroušek, certe nun nekre-dos, ke li festis 1-a de decembro sian 75 jarigon. Ni-aj deziroj estas simplaj: ankoraŭ multe da samfresaj-samviglaj jaroj kaj bonajn, interesajn tradukojn el monda literaturo.


visa^K smetol

lahôdkové mliečné margaríny na prípravu chutných koláčov

* Maslové, linecké, orieškové a iné cestá ľahko pripravíte s použitím niektorého z lahôdkových mliečnych margarínov. *

VISA a SMETOL rovnako výborne vyhovujú na prípravu kysnutého cesta, cestá v prášku ako sú linecké s kokosom, vanilkou a pod. *

*konataj laktaj margarinoj



staj kukoj*

por preparo de bongu

JARPROTOKOLO INTER CLE kaj ĈEA

AKCEPTITA
por la jaro
1980

1. Reciproka informado kaj spertinterŝanĝo

- 1.1. Interŝanĝo de bazaj labormaterialoj pri la Esperanta agado de la organizaĵoj.
Limdato: 30.11.79
- 1.2. Sendado de respondecaj delegitaroj al plenkunsidoj de la partneroj por interŝanĝo de spertoj kaj informoj pri nacia kaj komuna aktivecoj.
a/Delegitaro de CLE al la plenkunsido de CK de ĈEA Prago, 22.-24.2.80
b/Delegitaro de ĈEA al la plenkunsido de CLE dum majo 1980 en Magdeburg
- 1.3. Invito de tri reprezentantoj de Ĉeĥa Esperanto - Junularo al internacia junulara seminario.
Novembro 1980, Bad Saarow /ĉe Berlin/

2. Materialinterŝanĝo

- 2.1. 100 ekz. de "Starto" kontraŭ 150 ekz. de "der esperantist"
- 2.2. Interŝanĝo de la naciaj eldonoj de "Paco" por 1980, po 400 ekzempleroj.
- 2.3. Interŝanĝo de Esperanto-libroj laŭ bezono kaj eblecoj de ambaŭ partneroj. Flanke de ĈEA oni preparas jenajn titolojn:
J.Fučík: "Raporto skribita sur la pendumila maŝo",
K.Čapek: "Rakontoj el unua kaj dua poŝoj", "Kultura Almanako Panoramo", Prelegmaterialoj el la scienc-teknika seminario en Ústí n.L.
Flanke de CLE oni preparas jenajn titolojn:
"La internacia lingvo: Sciencaj Aspektoj", "Antologio de GDR-rakontoj".

3. Kunlaboro en kultureduka, kleriga, turisma kaj aliaj kampoj

- 3.1. Prezento de filmspektaklo pri 35-jara postmilita evoluo de ĈSSR "En koro de Eŭropo" kunlabore kun la Kulturcentro de ĈSSR en GDR, en tri urboj de GDR.
- 3.2. Reprezentanto de CLE prelegos en ĈSSR pri kultura politiko de GDR.
- 3.3. CLE informos la esperantistojn de GDR pri jenaj aranĝoj okazantaj en ĈSSR, preparitaj de ĈEA:
a/Kunveno de packonstruantoj en Pardubice: 15.03.1980
b/VIIIa Pacmarŝado en Jablonec : 19.04.1980

c/Kunveno de esperantistoj el okcidentaj partoj de CSSR, Karlovy Vary : junio 1980
d/Pacmarŝado Ležaky : 22.06.1980

- e/Somera Esperanto-Tendaro en Lančov: julio-aŭgusto 80
f/Seminario de sciencistoj kaj teknikistoj en Ústí n.L. /nur por fakuloj/ :26.-30.09.1980
g/IVa Kultura Esperantista Festivalo en Opava :12.-15.09.1980
- 3.4. ĈEA informos siajn membrojn pri aranĝoj okazontaj en GDR, i.a. IFER 1980 en Leipzig : marto 1980
- 3.5. Ĝis komenco de la jaro 1980 ambaŭ partneroj elektas minimume 5 grupojn kaj kreas inter ili amikajn ligojn surbaze de la oficialaj interurbaj ĝemelaj rilatoj.
- 3.6. Interŝanĝo de prelegantoj por seminarioj kaj esperantaj kursoj laŭ reciproka peto kaj ebleco.
- 3.7. ĈEA kaj CLE stimulos kaj subtenos la kunlaboron inter fakaj sekcioj, komisionoj kaj helpas interŝanĝi fakajn materialojn, kiujn eldonos la asocioj.

Berlin, la 28-an de septembro 1979

Por ĈEA: Zdenko Křimský
sekretario

Por CLE: Dr. Detlev Blanke
sekretario

ESPERANTO-KLASO EN BUDAPEŬTO

Projekciitaj bildoj aperas sur la ekrano, eksonas magnetofono... Komenciĝas la Esperanto-studhorso en la Esperanta klaso de la budapeŝta bazlernejo en Tomori strato. La audvidaj materialoj estas prilaboritaj kaj senditaj el Kibernetika Esplorinstituto de Paderborn. En vitrinoj sur la lerneja koridoro riĉa ekspozicio: kolekto de esperantajoj el diversaj landoj.

Laŭ la dokumento de HEA en la pasinta lernojarso Esperanto estis instruata krom en Budapeŝto en 16 departementoj de Hungario. Entute 1224 ĝelernantoj de la fundamentaj lernejoj partoprenas la Esp.instruadon, la aliaj 250 lernas la lingvon en kulturdomoj, resp. en fakrondoj de pionirdomoj.

Inter la lernejoj unuavice estas menciinda tiu en la Tomori strato, en Budapeŝto, fondita en la jaro 1952. Antaŭ dek jaroj tie komenciĝis la Esperanto-instruado. La lernejo havas du specialaĵojn: ĝi estas registrata kaj rekonata kiel lernejo kun sekcioj por korpokulturo kaj por Esperanto. Facileco de la Internacia lingvo kaj la eblecoj de internaciaj kontaktoj, precipe ekskursoj alilanden, kuraĝigas la lernantojn. La internacia kunlaboro kontribuas al la sukcesa instruado. Pri la amplekso de tiuj kontaktoj atestas ankaŭ notoj en la lerneja gastlibro kaj la salutoj ricevitaĵ okaze de la 25jara jubileo de la lernejo: ili alvenis el 26 landoj.

/laŭ Hungara Vivo/

Ĉu necesas agi tiel?

En unu nia najbara lando estas eldonata E-revuo kun tre bona renomo pro sia alta nivelo. Ĝi estas legata en multaj landoj - pri tio mi konvinkigis, kiam nia loka E-grupo presigis en ĝi sciigon pri nia letervespero.

La revuo publikigas regule enigmojn. Tri legantoj - ĝustaj solvintoj gajnas ĉiam libropremiojn. Nu, mi estis dufoje inter la feliĉaj gajnintoj. Do mi atendis ĝoje la libron. Pasis pluraj monatoj, sed nenio venis, jam la dua libropremio estis intertempe anoncita, sed denove nenio venis. Do, mi demandis ĉe la redakcio pri la afero. Neniu respondo. Mi demandis dua-, tria- kaj eble pli foje, ĝis mi fine minacis, ke mi ne plu abonos la gazeton pro la malserioza agado. Venis respondo, evita kaj neklara, sed la libroj ne venis. Mi skribis al amiko, kiu intertempe ankaŭ "gajnis", kaj lia respondo konfirmis, ke li havas la saman sperton kiel mi.

Nu, tiu afero koncernas nur malmultajn gesamideanojn. Ĉiuj esperantistoj ne solvas enigmojn. Sed mi estas ankaŭ reprezentanto de unu internacia E-organizo. Mi reprezentas ĝin en tri fakoj. Multe da e-istoj en la mondo havas similajn funkciojn. En sia periodaĵo, la internacia E-organizo publikigas iliajn adresojn kaj ankaŭ resumojn pri la nombro da reprezentantoj. Kaj en tiu resumo ne estas nombrataj la personoj, sed iliaj funkcioj. Do, ekz. mi estas kalkulata kiel tri personoj. Se iu s-ano reprezentas 5 fakojn, li estas kalkulata kiel 5 personoj. Sekve, la redakcio, pri kiu mi skri-

TRANSPORTA

nacia entrepreno, Chrudim

projektas, produktas kaj muntas ekipaĵojn por longdistanca bendtransporto en enteraj minejoj

ekipaĵojn por deponeja mastrumado plue ĝi elfaras levĉarojn kun flankaj ŝarĝeblo de portkapablo 5t kaj 6,3t kaj devirsspecajn pesilojn



FABRIKOJ DE MUEL-MAŝINOJ,
nacia entrepreno

PARDUBICE

trusto de la entreprenoj "Chepos"

portanto de la ordeno "Por la me-
ritoj pri la konstruado"

la entrepreno de la 50-a datreveno
de KPČS

laŭreato de la ŝtata premio de
Klement Gottwald

PROJEKTAS, FABRIKAS KAJ MUNTAS

- ŝtalajn silojn por greno
- kompletajn ekipaĵojn por la gren-siloj
- kompletajn ekipaĵojn por la nutraĵ-farejoj
- kompletajn ekipaĵojn por la gren-mueliloj
- sekigejojn de greno kaj la pluaĵa maŝinojn por la poŝtrikolta prilabo-
ro de greno
- produktoliniojn por la grajnigo de la sekigitaj furaĝo, luzerno, pajlo
kaj ceteraj nutro-miksaĵoj
- terkulturaĵajn helico-transportilojn por la transportado de la sil-depo-
nita nutraĵo
- bakistajn fornojn kaj pasto-porciilojn

Eksportanto:
TECHNOEXPORT BRATISLAVA,
Jašíkova 6

La marko "TMS"

tradicio - majstreco - solideco

EKSPORTANTA ENTREPRENO
KUN LA CENTJARA TRADICIO

bis unue, se ĝi trompas min, ĝi trompas tri personojn sam-
tempe, ĉu jes?

Ankaŭ mi abonas unu bone konatan E-an gazeton. Laŭ mia
scio ĝi aperas plej ofte en la tuta Esperantio. "Duonmonate",
oni povas legi sub ĝia titolo. Sed: dum la jaro aperas 17
n-roj! Do, la jaro havas 8 1/2 monatojn, ĉu jes?

Mi povas esti kontenta. Kvankam mi vivas kiel 3 personoj -
reprezentantoj, oni ne trompos min tro longe per la "gajni-
taj" libropremioj. Laŭ kalkulo de la "duonmonata" organo mi
vivas jam 92 jarojn, do mi baldaŭ mortos, kaj la afero estos
solvita. La internacia organizo perdos tri reprezentantojn
samtempe.

Necesas konsciiĝi, ke malserioza agado metas armilojn en
manojn de niaj malamikoj kontraŭ nin.

Ant.O.Esper.

☐ Trijara ciklo startis ☐

Por prepari kvalifikitajn estontajn funkciulojn de ĈEA kaj
solvi tiamaniere generacioproblemon, kiu povus regi en la kad-
rode asocio post kelkaj jaroj decidis estraro de ĈEA kaj ĝia
Porjunulara komisiono efektiviĝi trijaran ciklon de semina-
rioj, kie junaj delegitoj de lokaj grupoj povas gajni neces-
ajn sciojn por aktive labori kiel funkciuloj de centraj orga-
noj kaj lokaj grupoj de asocio.



Unua seminario de tiu ĉi ciklo okazis komence de novembro en
Merklin apud Karlovy Vary. Partoprenis ĝin 30 gejunuloj, kiuj
en rica dutaga programo informigis pri strukturo de E-orga-
nizoj en la mondo kaj precipe pri strukturo de ĈEA, pri ĉefaj
taskoj de asocio, pri interlingvistikaj aferoj, pri politik-
formitaj agadoj de NEM, kaj aliaj interesaj, kiuj povas for-
migi profilon de estontaj asociaj funkciuloj kaj ilian orie-
ntigon en internaciaj rilatoj. Prelegis s-anoj PhDr Jermář,
prezidanto de asocio kaj Zdenko Křimský, sekretario de asoc-
io. Ĉeestis ankaŭ dua vicprezidanto de ĈEA, kiu prizorgas Es-
perantan junularon, Věra Podhradská.

Partoprenintoj de seminario aktive partoprenis ĉiujn preleg-
ojn kaj dum ekzamenoj ili montris, ke bone komprenis. Ankoraŭ
dum kvar seminarioj estos daŭrigata tiu ĉi ciklo. Post ĝia fi-
no havos nia asocio gejunulojn, kiuj plene estas preparitaj,
povas plenumi diversajn taskojn en Esperanta - movado.

TRADICIO SPERTECO KVALITO



EMAJLITA MANĜUJARO
METALAJ AFIŜTABLETOJ
METALAJ TRANSPORTUJOJ
METALAJ BARELOJ


SFINX

ČESKÉ BUDĚJOVICE

La novaĵ seminarioj enhavos temojn pri ekonomio, etiko, oratoro, planado, lingvo, administro, psikologio, argumentado kaj aliaj bezonaj kaj interesaj temoj.

Venontjare aŭtune oni planas komenci ankoraŭ unu tian trijaran ciklon komenci. Tial ni petas estrojn de niaj lokaj grupoj elkti bezonajn junaj membroj/ ĝis 26 jaroj/ kaj informigi asocion pri la nomoj. Poste decidus estraro pri novaj adeptoj kaj invitos ilin al nova ciklo de seminarioj.

el leterkesto



Estimataj samideanoj,


kiel vi certe scias, la Esperanto-movado estis malpermesita en mia lando dum multaj jaroj, kio evidente traumatizis la portugalan esperantistaron. Tial nia asocio daŭre baraktas por revivigi la movadon.

Kun la celo dinamiki la asocian membraron ni eldonis ĉi-jare modestan interligilon / **INFORMA LETERO** /, kiu speras ĉi-monate.

Por plibonigi la asocian interligilon la redakcio bezonas informojn el aliaj landoj. Tiucele ni plezure sendos al vi nian senpretendan **INFORMA LETERO** kaj ni kuraĝas esperi, ke vi konsentos pri interŝanĝo de la viaj presaĵoj eventuale aliaj publikajoj de via Informa Fako, kio multe helpos al ni en la nia malfacila tasko

Kun sincera antaŭdanko vin salutas

D-ro J.A.Frazão de Faria
Avenida D. João II, n^o 56
RIO DE MAURO
2733 CACÉM - PORTUGALIO



Kara redaktoro !

Mi informas vin, ke en Krasnodar estis aranĝitaj du ekspozicioj pri Esperanto. Dum 30-a de septembro en Domo de Instruistoj kaj 14-a de oktobro en Biblioteko de Puŝkin. Partoprenis pli ol 200 da vizitantoj. Post ekspozicio komencos lerni Esperanton preskaŭ 100 da personoj. Kubanja ŝtata Universitato akceptis Esperanton kiel oficialan lernobjekton en fakultato de sociaj profesioj. Instruado daŭros du jarojn. Abiturienti - ĝantoj ricevos oficialan universitatan diplomon kiel Instruisto de Esperanto. Gvidantino estas Marina Kocarj.



ČESKÉ BUDĚJOVICE

HOSTINY
K PROMOCÍM
K SVATBÁM
K ŽIVOTNÍM VÝROČÍM
A JINÝM
PŘÍLEŽITOSTEM



Hotel SLUNCE
České Budějovice
tel. 6130, 6473

restaurace - kavárna - vinárna
- cukrárna - salónky



PARKHOTEL
Hluboká n./Vlt.
tel. 962281

restaurace - terasa
lov zvěře - rybolov



Hotel KRUMLOV
Český Krumlov
tel. 2040

restaurace - kavárna - salónky
- vinárna - tanec



Hotel OTAVA
Písek
tel. 2210

restaurace - kavárna - salónky
- vinárna - tanec



Hotel SVĚT
Třeboň
tel. 2646

restaurace - terasa
- koupaliště - rybolov

Prostřeno pro váš velký den ve všech INTERHOTELÍCH


KOMFORTNÍ
UBYTOVÁNÍ

DOKONALÉ
SLUŽBY

Agrikultura instituto akceptis ankaŭ Esperanton kiel fakultativan lernobjekton. Gvidanto estas Viktor Dudka.

Edgard Homić
ab. jaŝ. 4

SU 350000 KRASNODAR



-TEKNIKISTOJ - TEKNOLOGOJ - KONSTRUKCIISTOJ !

Laborkolektivo el Karl - Marx- Stadt/GDR/, kiu konsistas el 15 gekonstrukiistoj, kaj desegnistinoj, serĉas leteran kon-takton kun samfaka aŭ aligimila laborkolektivo en socialisma lando por korespondi pri ĉiutaga vivo, socialista vivmaniero laboro, amuzado, ĉiutagaj problemoj kaj problemetoj.

Ni konstruas ilojn kaj porproduktaĵn helpaparatojn en fabriko por trikaŝinoj kaj bicikloj.

Koresponda lingvo povas esti kaj germana kaj Esperanto. Esperanto estas preferata, ĉar la bona celo de la korespondado subtenus poresperantan propagandon.

Pridiskutu en via kolektivo, en via kolega rondo tiun ĉi alvokon.

En kazo de intereso kontaktigu kun mi.

Wilfred H o f m a n n

Kopernikusstrasse 60

DDR

9030 Karl-Marx-Stadt,

INFORMOJ DE SEKRETARIO

NIA ASOCIO eldonis al Internacia jaro de Infano kelkkoloran poŝtkarton kun infana desegno. Interesiganto povas ĝin mendici ni. Prezo Kĉs 1,-. Ĝi certe validas ankaŭ por 1980 jaro.

Samtempe vi povas mendici ĉe ni novan propagandan materialon - kelkkoloran legosignon por libroj. Prezo 1 Kĉs por 5 ekz. Legosignojn vi povas pagi ankaŭ per poŝtmarkoj.

Nia asocio eldonis ankaŭ antaŭnelonge novajn seriojn de la memglumarkoj kun motivoj poresperantaj. Du specoj rondaj en kvar koloroj havas sur 1 folio 12 pecoj de glumarkoj. La glumarko en diametro havas 34 mm kaj estas uzata por leteroj, bildkartoj, por fiksi afiŝojn kaj simile. Prezo de unu folio /do 12 glumarkoj/ nur ... 2,- Kĉs.

Plua speco de ronda glumarko ankaŭ kun poresperanta motivo, en kvar koloroj havas en diametro 63 mm kaj estas uzata por kofroj, tekoj, aŭtomobiloj, sur pordoj, poŝtkestoj k.s. Unu folio enhavas 4 glumarkoj kaj prezo estas .. 5,- Kĉs. Ĉiuj glumarkoj estas presitaj sur kvalita holanda brilanta papero. Suma eldonkvanto pli ol 215 000 da pecoj de glumarkoj.

POJEDETE NA 65.SVĚTOVÝ KONGRES? Všichni, kdož žádáte o de-
vizový příslib pro příští rok a rozhodnete se pro účast ve
Stockholmu, ihned nám napište, když uspějete. Zařídíme vám
poloviční kongresový poplatek ve výši 85 hol.guld. a přihlá-
šku. Jinak pro vás platí nezlevněná sazba podle tabulky:

Kongreskotizoj en guldehoj, ĝis: periodo:	79.12.31 unua	80.03.31 dua	80.06.20 tria	80.08.09 lasta
1. Kongresano ne membro indivdua de UEA.	170	187	204	240
2. Kongresano indivdua membro de UEA kun Jarlibro.	148	165	182	218
3. Kongresano indivdua membro de UEA kun Jarlibro kaj revuo	115	132	149	185
4. Edz(in)o de kongresano en kategorio 1.	119	131	143	179
5. Edz(in)o de kongresano en kategorio 2 aŭ 3	104	115	127	163
6. Junulo ĝis inkluzive 20-jara	51	56	61	97
7. Plentempa studento ĝis inkluzive 30-jara	85	93	102	138
8. Blindulo.	68	75	82	118

PACO - bulgaran eldonon vi povas facile rekte aboni ĉe Poŝ -
tovní novínová služba - dovoz tisku, Vinohradská 46, 12043PRA-
HA 2. Tiel ni ankaŭ rekte helpas al niaj bulgaraj amikoj, kiuj
eldonas menciitan gazeton. Mendu tuj pere de poŝtkarto.


Pluajn numerojn, kiujn eldonas aliaj landoj/inkluzive de niaj,
automate ankaŭ la separato de nia PACO, vi abonu rekte ĉe a-
socio. En la abonsumo 16, -Kĉs nia enkalkulis nur ekspediciajn
elspezojn kaj parte antaŭpagon por suplemento "Riporto skri-
bita en pendumila maŝo" de Juslius Fučík. Samajn kondiĉojn ha-
vas niaj eksterlandaj legantoj. Vi informu ĉe viaj perantoj au
rekte ĉe nia asocio.

ABONKOTIZO POR HEROLDO de ESPERANTO PLIALTIĜIS
por estonta jaro laŭ decido de eldonisto. Vi devos pagi 108, --
Kĉs. Kiu havas intereson tuj demandu asocion ĉu ankoraŭ estas
liberaj abonoj.

STARTO - nepravidelný věstník ČESKÉHO ESPERANTSKÉHO SVAZU Jil-
ská 10, Praha 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6 x
ročně. Za obsah tohoto čísla odpovídá Dr. Jaromír Jermář CSc a
Zdenko Křimský. Grafická úprava M. Labašta. Tisk zajišťuje Tech-
nické ústředí knihoven. Předáno do tisku 23. listopadu 1979. Do-
hlédací pošta Praha 07, snížený poštovní poplatek povolen Re-
ditelstvím pošt Praha, po č.j.zn.P/1-1267/79 ze dne 6. dubna 1979

STROJEXPORT

VACLAVSKÉ NÁMĚSTÍ 56
PRAHA 1 - ČESKOSLOVAKIA




HIDRAŮLIKA DRAGILO TIPO DH 103

La universala hidraŭlika dra-
gilo tipo DH 103 devenas per sia
konstruo el la antaŭa tipo 101. Ĝi
servas por translokado, fosado,
konstruado, finlaboroj kaj pluaj
plej diversaj teknologiaj terlab-
oroj. La vastaj eblecoj por uzi
la maŝinon estas je dispono per
sortimento de diversaj labormek-
kanismoj, kies iloj aŭ uzataj

oj estas regataj rekte per altpremaj hidraŭlikaj cilindroj kun funkciigaj movoj de la
unuopaj partoj de la labormekanismoj en ambaŭ direktoj. La kompleta pezo ĉe funk-
ciado inkluzive la stabiligan ŝargon estas ĉirkaŭ 27 tunoj kaj ĝi sangigas laŭ tio, ki-
uj labormekanismoj estas uzataj.

La dragilon funkciigas bone elprovita dizelo Škoda ML 634, kies laborefiko estas
175 ĉevalpovo.

La novan hidraŭlikan dragilon DH 103 fabrikas Uničovské strojírny (Maŝinfabri-
koj en Uničov), eksportas ilin monopole Strojexport en Praha, Ĉeĥoslovakio.



AUTOBAZAR
ENTREPRENO »KLENOTY«